# Ni salutas vin!

La trankvila valo de la rivereto Murz dum la unuaj tagoj de februaro estos plena da vigla vivo. El multaj landoj la laboristaj sportuloj estos alvenintaj, por partopreni al nia internacia festo, al nia festo, kiu ne nur estu „festo“, sed ankaŭ manifestado de nia batalpreteco.

Ni salutas la laboristajn sportulojn, kiuj el fremdaj landoj venas al ni, kiel batalkunulojn. Ili batalas en sia hejmlando por la grandaj celoj de socialisma kreado. Ilia klopodado direktiĝas kontraŭ pereanta mondo kaj ties defendantoj kaj laŭdantoj. Ilia laboro en ĉiuj landoj estas malfacila kaj oferplena.

Pri tio ni aŭstrianoj popus rakonti multon al vi. Dum la lastaj semajnoj ni devis defendi nin kontraŭ filistra, fanatika kontraŭulo. Ni devis per ĉiuj fortoj defendi la demokration kontraŭ la faŝismo, la vivorajton de libera popolo kontraŭ la sklaveco de perforta reĝimo.

Fiere ni povas diri, ke la aŭstria laborista klaso en tiu ĉi batalo atingis honorplenajn rezultojn. Brile flirtas ĝiaj flagoj super la urboj kaj industriaj distriktoj de nia lando. La kruda perforto de la faŝistoj ne povis malfortigi ĝin.

Ke tiel estas, la demokratio antaŭ ĉio devas danki ankaŭ al la junularo de la laborista klaso. Estis ĝi, kiu dum la tagoj de la batalado staris en la unua vico. Tial salutas la laborantaj homoj en urbo kaj kamparo per aparta ĝojo la internacian feston de la laboristaj sportuloj, de tiuj bravaj pioniroj en la batalo por pli bela estonteco: Amikecon!

**Julius Deutsch**

---

# Eintrittspreise:

A. Die Inhaber von Teilnehmerkarten haben zu den sportlichen Veranstaltungen und zu den Festabenden freien Zutritt.

B. Dauerkarten zu allen sportlichen Veranstaltungen (Ganzstein und Eislaufplatz) S 2·—.

C. Tageskarte für die Festplätze S 1·—.

D. Eintritt zu einer der festlichen Veranstaltungen S 1·— (nur nach Maßgabe der vorhandenen Plätze).